



PENSEO

N-ro 364

feb. / 2022

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro <http://www.elfino.cn/penseo/penlisto.htm>

Wally du Temple (Kanado)



Mortletero Skizita Nigre

Pri: Ĝisela Braŭn.

Kiam juna mi svatis amikinojn distance
Maloportune por tuŝi dum en ritmo dance,
Manskribis amleterojn pere de Esperanto
La lingvo Internacia kiel edzperanto.

Anticipa promeno plezuris al poŝkesto.
Ĉu de Olga, Ĝisela, Ann aŭ Kloklo pri festo,
Detaloj pri rendevuoj sed kongresprivataj
Ĉu fotoj kun la notoj pri agoj amrilataj.

La leterkesto sidis sur apudvoja fosto,
El ligno de arbaro, Kanada sovaĝforsto.
Narcisoj flavaj kreske ridetis primavere.
Koro kaj miaj sonĝoj imagis prisomere,

Kiam instruisto havas libertempon vagan.
Mi jam faris planon, atendas konsenton ŝian.
Tegmenton, plankon kaj porton havis tiu kesto
Por ambirdoj vere estus hejmaloga nesto.

La pordon mi malfermis, koverton vidis unu.
Adreso Frankfurta, pri mia 'Ĝisela' sunu.
Sed strange preslitere vortoj majuskle aferas,
Kiel burokrata dokumento; pensoj sferas.

Dikrando enkadrigas la etikedsurfacon.
La koloro nigra aĉplenigas ties spacon.
Fingroj impete sed nevole disŝire servas,
Elpaki kion ŝia frato prov-advokatas.

Kondolencoj kaj detaloj pri tre aĉa murdo.
Frenezulo mortpafis Ĝiselon sur la strato.
Ŝi hejmon celis post koncerto, 'Brahms'
Rekviemo.

Maniulo murdis ŝin por groŝa tantiemo.

Polico trovis inter roboj de ŝi koncertaj
Kortuŝan taglibron, notoj al mi apertaj.
"Mi iras nun al mia koncerto plej ŝatata,
Konfesas pri mia sonĝo rave sopirata,

Tuŝapude kunesti en 'Elsinor' Danlando,
Amindumi sur arĝenta sablo, tia strando.
Tranokti kun vi en mia lito, kaj sopiru,
Ke vi restu kaj neniam per trajno foriru."

Malĝoja, emocia aflikto min kripligis.
Nenia kondolenco nek fortbrando mildigis
Miajn angorojn ĝis mi aŭskultis fatalisme
Al tiu rekviemo kaj sonĝis optimisme.

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Hororo de tago sen okazaĵo

Je tiu loko je la 15-a de majo
en la jaro 1785 okazis tute nenio.

Do eĉ ne iuj dormemaj vulpoj
diris bonan nokton reciproke.
Neniu prironĝita homosto
montriĝis sur plado de la restoracio
„Buĉisto Hamann & filoj.“

Neniu urso volis ŝteli mielon
en la magazeno „Domo de mil aĵoj“.

Neniu transveturigita erinaco
postrestis sur la foirplaco
por peti pri lasta pelvo kun lakto.

El neniu kulo ekestis elefanto
kaj la urbestro eĉ ne promesis
la bluan de la ĉielo al siaj balotontoj.

Neniu mortis kaj neniu naskiĝis
aŭ aŭdis la lastan pafon,
estis tago, en kiu desepere malĉeestis
la historio kaj la bulvardaj gazetoj.

La Tago sen okazaĵo eĉ ne disponigis
iujn vagabondojn aŭ judojn,
kiuj oni povus rosti sur rostkradoj
pro tro da enuo kaj malamo.

Se almenaŭ onjeto Fibuŝo estus
falinta sur banano elmetita
de iuj malicaj buboj. Sed ve,
eĉ tio ne okazis!

Tiaj tagoj estas nur malfacile elteneblaj,
ĉar la senokazeco la karajn homojn
eĉ pli timigas ol la hororo de l' vakuo.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Mia fidela abio

Abundon de koloroj oni akiris,
Ĝis somero kaj aŭtuno foriris.
La naturo ekdormas en grizeco;
Kiu konsolas min kun verdeco?
Mi rigardas la abion en ĝardeno,
Baldaŭ dispeliĝas tuta spleno.
Li estas ĉiam mia fidela kunulo,
Ankaŭ dum mia eraro en nebulo.
Li etendas brakojn kun neĝo,
Kora kaj pia estas lia preĝo.
En la fundo de vintro rigora,
Jam ŝvebas la brizo favora.

Du etaj Steloj

Vespere ĉe la fenestreto iam,
Mi estis flustre vin demandanta:
Ĉu vi restos kun mi por ĉiam?
Ho, mia infano, vi estis diranta.
Du etaj steloj pendas ĉe la alta ĉielo;
Ili iros kun vi tutmonde por sama celo.
Etaj steloj fariĝas mia saluto lasta;
Pensu min dum mia foro al mondo vasta!
Ho, ĉe la fenestro iu staras,
Dum la nokta kurteno falas.
La samaj vortoj el loko fora,
Ŝvebas al li kun vento favora.

Ángel Arquillos (Hispanio)



Angoro

En mia propra domo
mi estas sendoma,
kaj mia propra korpo
estas senkora.
Mi ne vivas,
mi ne amas,
mi nur ploras...
Kiu venos kaj de kie?
ĉar mia koro doloras,
mi petas al vi, amiko,
ne hezitu,
ne klopodu helpi min,
kun risko...
Mi kutime estas sola.

Mallonga vivo

Guto da akvo
sur blanka marmoro
glitiĝas kun timo,
ĉar ĝi antaŭsentas
ke supla ban-tuko
baldaŭ ĝin forigos.

Tamen, ĝi ne pravas
 ĉar centoj da gutoj
 plenigas denove
 la blankan marmoron,
 ĉar en la banujo
 knabeto petole moviĝas
 kaj miloj da gutoj multiĝas
 kaj nia gutet' pormomente
 forĵetas la timon,
 sed ankaŭ konscias
 pri mallonga vivo,
 ĉar gutoj nur vivas
 la daŭron de bano
 kaj ĝi simple timas
 apud la ban-kuvo,
 ke baldaŭ la knabo
 solvos ĝian dubon.

Marzena Wawrziczkowa (Pollando)

en unu el la lasta decembro markita
 tago de la vintra suno malpeza vibrado
 mi desegnas per volonteca mano el paperaj
 sako
 sunfloro, mirteloj, vinberfolio

blankigitaj folioj kaj frostigitaj floroj
 plenaj de aromo jam disvolviĝas
 sekaj beroj rezignas la tinkturfarbon
 la akvo, kiu semas kun vivo senĉese

mia korpo sopiras varmajn infuzajojn
 herbaj banoj, matenoj kun la suno
 aprilo, majo kaj aŭgusto el Ĉucja
 klaraj ventoj aldonos tempon

* *

inter la restaĵoj de foliaro, sur arboj kaj bariloj
 kie la rozo estas karmina vokanta palmojn
 estas ĉiamverdaj hedero folioj
 najbaroj bonorde vunditaj

unu paŝon pli malproksimen la visko plektiĝas
 la poplo
 ekbrilo de la potenco de perlaĵ beroj
 aliflanke, pego sur pingloarboj
 li deklamas arbarkanton sur pinarbo

la mirtingo estas ankoraŭ nova
 la amara gusto de somero alportas
 Decembre ferioj de ĉiamverdaj plantoj
 pervinko kaj piceo post tiam

* *

batado de flugiloj, brilo de materialo
 predanta movo kaj pinglo-akreco
 mi denove rigardas flanken, harojn en bulko
 decidaj duopaj gestoj
 korpo tiel facilmovi, admirinda murmuro
 la ombroj karesas per la krudeco de la vortoj
 eĥo en la spaco, la dancejo estas mia
 la spegulo spegulas la susurojn de suspiroj

Minosun (Ĉinio)



Kvar hajkoj

Fride pluvadas
 Oranĝruĝaj ombreloj
 Flose sporadas

Lunlumo brilas
 Paŝoj sonas ĉe pordo
 Hundoj ekbojas

Enmane koko
 Surdorse bebo, iras
 Ŝi al hejmloko

Pridubas kapo
 Sed allogiĝas korpo
 Fieras trompo

Jadranka Miric (Serbio)



Sentiĝole

Nubetoj grizaj dance viciĝas.
 Sunradioj brile aperiĝis.
 Baldaŭ ĉiuj nubetoj disiĝos!
 Ĝus ekflugis al ĉielo turtoj.
 Gaje kveras super niaj kapoj!

Iuj sidiĝas pare sur branĉo.
 Via mano kaŝiĝas en la mia.
 En okulo mia speguliĝas vi.
 Sur miaj lipoj rido kiel sur la viaj!
 Subita alflugo de juna turto
 sur lian ŝultron tre gajigis nin.
 Forte sed karese ni kaptis ĝin.
 Iuj infanoj balonojn lasis
 flugi alten en ĉielo kriante;
 Flugu libere! Ni samon faris!

Kosma travivaĵo

Tra fermita fenestro vidiĝas
 kiel neĝeroj vigle faladas.
 Ĉiu ruĝa tegmento blankiĝis.
 Araneaj neĝeroj ĝisnokte dance laciĝis.

Paca nokto, luno krozas
 ĉielen lumigita de stelobriroj.
 Rigardis lin knabino Jana
 starigis al si demandon vana.

Kial vi min ne volas kunporti
 kun viaj steletoj kune danci
 ĝis aŭroro je horizonto helviola!
 Poste vekigu min, kvankam mi estos sola.

Kosma travivaĵo nia
 restus via kaj mia sekreto
 priskribita iam en mia reto.
 Luno fripone okulsignis,
 malantaŭ eliranta suno malaperis.

Neĝo kaj vento

La neĝeroj tutnokte valson dancis.
 Rapide kaj dense ili senlace faladis
 kvazaŭ sorĉistino pelus ilin
 iri pli norden por saluti vin.

En la familio Bi estis fratoj tri.
 Anso, Pepo kaj Lido.
 Ĉiuj forgesis pri fido.

Ne pri solidareco sciis ili.

La valoj kaj altaĵoj beliĝis.
 Ĝisvespere tri Neĝuloj naskiĝis
 por ĉiu tri en la sama korto!
 La frateco estis forgesita vorto!

La alvenonta vento mokis ilin
 malantaŭ verda pino
 en la branĉar' kaŝis sin.
 "Unu neĝulo sufiĉas"
 kaj alĵetis aliajn du al ilia sino!

Elena Popova (Bulgario)



Medito

Ve, denove disiĝo!
 Hajlonuboj ruliĝas
 kaj tondras de l' ĉiel'.
 Koro, trankviliĝu!
 Ne timu, mia koro
 de l' bato de l' sorto!
 Vi ja estas forta.
 Ne ploru, kara koro!
 "La nuboj kaj la solec' ploras pro l'
 homa sort'..."

Riĉa aŭtuno

Poplo altstatura –
 donac' de l' naturo,
 per ĉapel' fieras,
 antaŭ la ĉielo.
 Fama kaŝtandarbo
 la fruktojn ne ŝparas
 kaj juglandarb' multjara
 donacas malavare.
 Finis la somero.
 Regas sur la tero
 beleco bunteco –
 aŭtuna riĉeco.



Vent-vagulo

Vento petolas
 kaj fajfas laŭvole
 al la branĉetoj,
 al la floretoj...
 Fajfas kaj ridas
 gaje, kontente—
 ni ĝin ne vidas.
 Pentristo talenta
 skizis rapide
 la vagulon – venton.
 Restis senmorta
 sur bild' la vento.



Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Zeŭso



Jen Zeŭso, ĉarma mopsohundo, la trezoro de Lucas, mia filo.

Impona nomo de la ĉiopova greka dio!
 Aminda hundeto. Noblaspekta figuro, plata muzelo, sulkiĝinta kapo, tre esprimplenaj rondaj okuloj. Li ŝajnas kiel serioza pensulo, maltrankvila pri la homa malboneco.
 Molkorpa, inteligenta, karesema. La 18-an de februaro li estos unujaraĝa. Sub la signo de Akvario, li estas petolema hundeto, kiu ŝatas ludi, sed facile laciĝas.

Tamen li estas feliĉa, ludema, en sia hunda senkulpeco. Pura amo, fidela amikeco.

Fideleco ĝis morto; eĉ post morto, kial ne? Lia feliĉo kuŝas sur la ĉeesto de mia filo.

Juiz de Fora, 07/01/2022.

Odilon-Jean Perrier*



Gajno nia sekreta plurestos,
 Kaj ni kune trinku iom da vin'.
 Ci knabino pli milda ol besto,
 Kiu estas masko de la destin'.
 Cia ridet' ŝirita jen miro,
 Sed la diojn miajn ne konas ci,
 Dum sobredelira mi sen diro,
 Ilin svage kunbrakumas en ci.

** belga poetino (1901— 1928)*

elfrancigis



Roland Platteau (Francio)

Olga Ŝeveleva

Kial mi en poemoj bezonas?
 La poemoj kuracas!(respondas)
 De malgajo kaj de depresio,
 De senlima kaj nigra sopiro,
 kiu koron turmentas, disŝiras.
 Ne ektimu sendube, ne ĉiam!
 Iam, tiel okazas, nur iam.
 Povas koro dolori, sentinte la plagon,
 Tiam mi poemaron enmetas en sakon,
 Laŭ voj' legas, ĉiam rapide
 Kaj per ĝi, min de mi deirigas,
 De problemoj, de hejma malordo,
 Pro laciga kura" laŭ rondo,
 De tutviva senfina demand'(kial, kien?)
 Pro la amo, kiun mi ne kapablis restigi,
 Pro koŝmara ĉenstabla movado,
 Inter ĉiuj ŝtonetoj— kaj mia estado
 Pro la land' mia— en neniec' forĵetita,
 Pro malĝoja destino al ni promesita,

Pro (citat’), ke “malica, malĉasta” nur mokas
“Jarcento, Kaj ŝajnas, ke Di’ ne revokas”.

Do, mi la poemaron tralegas,
Helpos ĝi min ne morti, mi pensas, esperas.

Esperantigis



Rita Mkrtychyan (Armenio)

Vi preteriras kun la luno

Meznokte aperas la luno,
la mondo estas en silento,
mi serĉas por vidi vian belecon
je la lumo de la luno.
Preskaŭ alvenas la suno
por bani la teron per varmeco,
vi preteriras kun la luno,
lasante al mi bedaŭron.
Sed la vivo ne haltas
kvankam via beleco franda
forlasas miajn sonĝojn,
ĉar mi ĉiam esperas.

*el la poemo "HO MFIN KUM MOK FUNAN" en la
davana lingvo*

Kefa, Timoro, februare 2011

Sitor Situmorang*

Malpeza brizo je la novjara mateno

(Al Hans kaj Joosye Teeuw)

Jen la unua vidaĵo
je la novjara mateno:
La ĉielo estas hela.
(La neĝo ankoraŭ ne falas)
Proksime de la fenestro, sur la branĉo
de maljuna arbo nuda, senfolia
kiel kutime je la vintro.
Aperas tri kolomboj
silentataj en la suno por bonvenigi
la printempon.
Krome, la universo ankoraŭ silentas
kiel ĝi antendas signon
de la printempo.

Unu momenton
la molaj plumoj de la kolomboj
ŝajne preskaŭ tremas.
Blovataj de la malpeza brizo
de universo ekster la universo.
(Sur la malbordo Scheveningen,
la 1an de januaro 1998)

Yogyakarta, la 31an de aŭgusto 2007

Originala titolo: Angin Sepoi di Pagi Tahun Baru

** Sitor Situmorang estas unu el la indoneziaj konataj
poetoj.*

Esperantigis



Yohanes Manhitu (Indonezio)

El Ĉina Antikva Poezio

Li Qingzhao (1084-1151)



—laŭ melodio *Serena muziko*

En neĝ’ antaŭe ĉiujare
mi ofte umeflorojn metis
sur mian kapon por ornamo.
Sed poste ilin knedis
enmane mi sen bonhumoro.
Kaj mi pro tio ĉiam ĵetis
larmerojn plene sur la vestojn,
kaj tian malĝoj-scenon mi ripetis.

Ĉi-jare kiam umefloroj pompas,
mi tamen trovas min en foro.
Jam ĉe l’ tempioj kreskas
hararo mia en la grizkoloro.
Minacas la vespera vento
balai kun muĝ-roro.
Aromo umeflora malaperos

kaj floroj falos en blov-horo.

—**laŭ melodio *Printempo en Wuling***

La vent' jam ĉesis blovi,
falintaj floroj sur la tero
ankoraŭ spiras bonodoron.
Alvenas la vespero,
mi tamen ne volantas kombi
la harojn kun ribelo.
Pejzaĝo restas sama,
sed homoj jam ŝanĝiĝas pro ielo.
Senvorta mi jam ploras
per sangaj larmoj en despero.

Laŭdire la pejzaĝ' de Shuangxi
ja pitoreskas vere en fabelo.
Mi volas tien iri sola
vojaĝi per boato por la belo .
Sed mi nur timas, ke l' boato
malgranda tiom, ke ĝi sur rivero
ne povus ŝargi miajn ĉiujn
ĉagrenojn de mizero kaj sufero.

—**laŭ melodio *Fiŝista fiero***

Nebul' vualas nubojn sur ĉielo,
en stelriver' mil veloj flosas en lumhelo.

Animo mia kvazaŭ iras al ĉiela blu',
la ĉielreĝ' demandas, kien mi veturas plu.

Raportas mi al li, ke longas la vojiro
kaj versojn mi produktas kvazaŭ en deliro.

La fea birdo ŝvebas per favora vento
jen sur naŭdek-mil-lia vasta firmamento.

Ho, vent', ne ĉesu kaj alblovu forte
boaton mian al la fe-insul' alporte.

Lju Benzong (1084-1145)

—**laŭ melodio *Moruskolektanta knabino***

Vin mi malamas:
kial vi ne similas al la luno super turo?
En kia ajn direkt' ĝi ĉiam

ja ĉirkaŭ l' turo sen forkuro.

Vin mi malamas:
kial vi ja similas al la luno super turo?
Ĝi jen pleniĝas jen arkiĝas,
kiam ĝi ree rondos en figuro?

—**laŭ melodio *Suda kanto***

Lunlumo ĵetiĝas oblikve sur vojon,
la ponto sur roj' vualiĝas per prujno
matena.

Trans heĝo elŝovas la kapon
velkinta la flor' krizantema.
En monta profundo tiela pasigis
mi Duobla-Naŭan Feston* ĝenplena.

Estas malfacile por dormi profunde
sur voj' vojaĝa korp-ĝena,
kaj plie tamburaj frapsonoj de nokto
malvarma treniĝas en long' abomena.
Laŭdire eosto de la riverfluo tre belas,
mi tamen sopiras al mia hejmloko
sensplena.

* *La festo okazas je la naŭ-a de la naŭ-a monato laŭ la luna kalendaro, dum kiu tradicie oni montras respekton al gemaljunuloj.*

—**laŭ melodio *Paŝo sur herbo***

Neĝer' similas umefloron,
kaj umeflor' similas al neĝer'.
Ha, kia similec' mirinda!
Allogas onin l' umefloro per
aromo rava, kiu vere scias?
Do, turnu vin ja kun prefero
al luno por demandi,
ĉu l' similec' nur estas en aper'?

Lastjare dum spektado
al umefloroj laŭ memor'
mi kaj vi, mia kara karulino
paŝadis sur la neĝkovrita vojo por
serĉadi umeflorojn kun plezuro.
Ni nun oldiĝas, ne plu en parol'
pri la pasintaj travivaĵoj.

Por kiu ebriiĝas mi ja pro dolor?
 kaj ree mi sobriĝas fojrefoje?
 Ankoraŭ ĝis nun mi pripentas
 disiĝon la tiaman pro frivol'!

elĉinigris



Vejdo (Ĉinio)

Lu Kai (? - ĉ. 504)

Dediĉi poemon al Fan Ye

Mi plukas umefloron, por ke sendu
 al kara mia ĝin la kuriero.
 Sudlande ja nenio donaceblas,
 krom frondo kiun benas primavero.

Fan Yun (451 - 503)

Kurta restado en Xinting

Fore de l' rivero arboj ŝajne flosas;
 rande de l' ĉielo sola fumo rektas.
 La rivero kaj ĉielo kunfandiĝas;
 fumo kaj arbaro similaj aspektas.
 Nu, de kie fontas blua fluo vasta,
 kaj la velo alta kien sin direktas?

Wu Jun (469-520)

Hato sur monta supro

De monta horizonto nun alŝvebas brumo,
 sin montras tra bambuoj subiranta suno.
 Super tegmento birdoj giras, blankaj nuboj
 eliĝas el fenestroj en ĉiela lumo.



Xue Daoheng (540 - 609)

Nostalgio en ekprintempo

Du jarojn pli frue mi l' hejmon forlasis.
 Post la ekprintempo sep tagoj jam pasis.
 Sovaĝaj anseroj norden min antaŭis,
 sed, antaŭ l' florad', min hejmveo ĉirkaŭis.

Chen Tuan (906 – 989)

REVENO AL ERMITEJO

Dek jarojn mi vane klopodis en tiu ĉi mondo,
 Foj-foje en sonĝo alpaŝis al mi ermit-monto.
 Honora rangeco kontentas malpli ol dormado;
 Riĉaj zorgas pli ol malriĉaj en la vivparado.
 Deprimas aŭd' pri suvereno en militdangero;
 Afliktas vid' pri ebruloj de orgiprefero.
 Kun libroj malnovaj al ĉi ermitejo mi iros, —
 Printempan aeron, ĉu floroj, ĉu birdoj, elspiros.

elĉinigris **Minosun (Ĉinio)**



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-SEPA

Fabloj

§27-01

El miaj paroloj la naŭ dekonoj estas fablecaj kaj la
 sep dekonoj estas cititaj, dum la paroloj, kiujn mi
 eldiras ĉiun tagon laŭ la cirkonstancoj, estas konformaj
 al la naturo.

La naŭ dekonoj de miaj paroloj, kiuj estas fablecaj,
 sin apogas sur alies paroloj por klarigi miajn pensojn.
 La patro ne povas servi kiel svatanto por sia propra filo,
 ĉar liaj laŭdoj neniel egalas tiujn de aliaj. Tio estas
 kulpo ne de la patro, sed de la aliaj, kiuj dubas. Mi
 konsentas pri tio, kio estas la sama, kiel mia opinio, kaj
 malkonsentas pri tio, kio ne estas la sama, kiel mia

opinio. Mi aprobas tion, kio estas la sama, kiel mia opinio, kaj malaprobas tion, kio ne estas la sama, kiel mia opinio.

La sep dekonoj de miaj paroloj, kiuj estas cititaj, celas meti finon al pluaj disputoj, ĉar ili estas diroj de respektindaj pliaĝuloj en la antikveco. Sed se iu pliaĝulo ne havas brilajn opiniojn, li ne povas esti kalkulata inter niaj respektindaj. Tiu, al kiu mankas la saĝeco kaj la virto de induloj, estas homo ne dotita per la Taŭo, kaj tiu, kiu ne estas dotita per la Taŭo, estas homo nur maljuna kaj senutila.

Ĉar la ĉiutagaj paroloj laŭcirkonstancaj konformas al la naturo, ili disvastiĝas vaste kaj dise kaj multiĝas abunde kaj libere de la jarkomenco ĝis la jarfino. Kiam oni parolas sen vortoj, oni identigas sin kun la naturo, ĉar la vortoj ne estas naturaj kaj la naturo ne estas identigita kun la vortoj. Tial estas dirite: “Ne parolu per vortoj.” Se oni parolas sen vortoj la tutan vivon, oni ja parolas, kvankam ne uzante vortojn. Tiukaze kvankam oni neniam parolas la tutan vivon, oni ja parolas.

Devas esti la kaŭzo, kial io estas akceptebla, kaj devas esti la kaŭzo, kial io estas neakceptebla. Devas esti la kaŭzo, kial io estas ĝusta, kaj devas esti la kaŭzo, kial io estas malĝusta. La kaŭzo, kial io estas akceptebla, estas, ke ĝi mem estas akceptebla, kaj la kaŭzo, kial io estas neakceptebla, estas, ke ĝi mem estas neakceptebla. La kaŭzo, kial io estas ĝusta, estas, ke ĝi mem estas ĝusta, kaj la kaŭzo, kial io estas malĝusta, estas, ke ĝi mem estas malĝusta.

Ĉiu estaĵo naskiĝas akceptebla kaj ĉiu estaĵo naskiĝas ĝusta; neniuj estaĵoj naskiĝas neakceptebla kaj neniuj estaĵoj naskiĝas malĝusta. Se miaj ĉiutagaj paroloj laŭcirkonstancaj ne konformas al la naturo, kiel do ili povos daŭri longatempe? Ĉiuj estaĵoj estas dividitaj en diversajn kategoriojn kaj tipojn kaj sin sekvas reciproke en diversaj formoj. Ili komenciĝas kaj finiĝas en senfinaj cikloj, kio estas nekomprenebla al la homoj. Tio estas la ekvilibro de la naturo. La ekvilibro de la naturo signifas la konformecon al la naturo.

§27-02

Zhuangzi diris al Huizi: “Konfuceo nun estas sesdekjara, kaj dum sia vivo li sesdek-foje ŝanĝis sian opinion. Finfine li neis kion li aprobis en la komenco.

Estas malfacile por homo de sesdek jaroj diri, ĉu tio, kion li nun aprobas, estas ĝuste tio, kion li ĉiam malaprobis dum la kvindek naŭ jaroj.”

“Ĉu Konfuceo estas studema kaj dokta?” diris Huizi.

“Li jam ne estas plu tia, sed li neniam tion konfesis. Li iam diris: ‘Ĉiu homo ricevas de la naturo siajn talentojn kaj vigligas ilin en sia vivo.’ Li kantas laŭmelodie kaj parolas laŭregule. Kiam li alfrontas la problemon pri profito kaj justeco, liaj paroloj pri la distingo inter la ŝatoj kaj la malŝatoj, inter la aproboj kaj la malaproboj, estas nenio alia ol io, kio servas por konvinki la homojn. Sukcese konvinki la homojn, tiel ke ili kuraĝas montri nenian spitemon, — jen la sola maniero stabiligi la mondon. Sed lasu tion! Lasu tion! Kiel mi povus esti komparata kun li?”

§27-03

Du fojojn Zengzi fariĝis regnificisto kun malsama animstato. Li diris:

“Dum miaj gepatroj vivis, mi tre ĝojis kun la salajro nur je dek ok buŝeloj da greno. Nun ke miaj gepatroj jam mortis, mi malĝojas, kvankam mi estas salajrata je mil okcent buŝeloj.”

La disĉiploj demandis Konfuceon:

“Ĉu ni povas diri, ke Zengzi estas libera de ĉia ekstera ligilo?”

“Li tamen submetis sin al la ligilo de la salajro,” respondis Konfuceo. “Se li estus libera de ĝi, kiel li povus senti sin malĝoja? Li devus rigardi la dek ok aŭ mil okcent buŝelojn da greno kiel birdojn aŭ moskitojn lin preterflugantajn.”

elĉinigi



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yanke (Ĉinio)

Vintro

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Vent'
malvarma el okcident'
ekblovas
per korp-pika sent'.

Neĝ'
falas sur alta monteĝ'
kviete
en gela sieĝ'.

Blank'
kovrila de flank' al flank'
vualas
sur la tera plank'.

En
severo de la neĝ-regn'
verŝajnas
morta la ĝarden'.

Nur
regas brile blanka pur'
sur ĉio
en venta susur'.

El
grizblanka vasta ĉiel'
disfalas
flokoj en liber'.

Jen
amasiĝas neĝ' en scen'
pli kaj pli
kun frida plenplen'.

Dom'
varma kiel la patron'
protektas
homojn laŭ sezon'.

Nur
infanoj ja en konkur'
ludadas
kun neĝ' en plezur'.

Ĉu
ili nur ludas kun ĝu'
sed timas
malvarmon ne plu?

Sed
neĝo estas nur obsed'
portempa,
ne tutjara ted'.

** Dekses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj
de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Jadranka Miric (Serbio)

Infanoj kaj vento

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Eliris
suno frue. Ho,
kia varma kareso.
Ludis kiel infano
kara venteto.

Ĝus blovis
la vent' pli forte.
Kun krioj ĝi ekflugis
al infanoj forporte
pilkon elkorte.

Infanoj
kriis aĉe tre.
“Redonu pilkon al ni”!
“Kaptu ĝin”!—ĝi blovante
ridis fripone.

La alia
knabo forlasis
drakon alten flugadi.
La vento ĝin puŝis
pli suben. Miris

la knabo.
Kia estas ĉi

venteto? Ĉu ĝi solas?
Se jes, mi ludos kun ĝi.
Tio bonas por ni .

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Luiza CAROL (Israelo)

Aliaj pordoj malfermiĝas

Dorela estis knabino, kiu loĝis en malgranda domo apud bela parko. Ŝiaj gepatroj estis kantistoj, kaj en ŝia familio, ĉiuj ludis diversajn muzikilojn aŭ almenaŭ ŝategis aŭskulti muzikon. Tial, nemirinde ke Dorela ŝatis kanti kaj deziris fariĝi kantistino. Ŝi ankaŭ lernis ludi gitaron.

La domo de Dorela havis tri ĉambrojn. Ĉiuj muroj estis tegitaj per specialaj materialoj, kiuj izolis la sonojn. Ankaŭ ĉiuj fenestroj havis specialajn ŝutrojn, per kiuj oni povis izoli la sonojn laŭnecese. Tiel, la patro kaj la patrino de Dorela povis trejniĝi kantante unuope, ĉiu en sia ĉambro, aŭ kantante duope en la sama ĉambro. Dum ilia ĉiutaga ekzercado, Dorela povis ĉeesti por aŭskulti ilin se ŝi volis. Ŝi ankaŭ povis resti en sia ĉambro kaj eventuale aŭskulti muzikon pere de radio. Ŝi povis ankaŭ kanti aŭ ludi gitaron sen ĝeni la gepatrojn.

Ĉe la domo de Dorela troviĝis malgranda korto, kun unu sola maljuna arbo. Multaj birdoj venis el la parko por viziti tiun arbon, je kies branĉoj la knabino pendigis ujojn por grajnoj. Dorela amis la birdojn. Ŝi amikiĝis precipe kun iu muzikema verda papago. Ŝi nomis lin Dodo, kaj li alvenis kiam ŝi alvokis lin. Dorela instruis lin diri “saluton”, por bonvenigi la esperantistajn amikojn de la familio. Kiam ŝi kantis en la korto, Dodo provis imiti ŝin. Kiam ŝi gitarludis, Dodo imitis la sonojn de la gitaro. Dorela eĉ instruis lin kanti ŝian nomon laŭ 3 muziknotoj: “DO... RE... LA...”

Kelkfoje, kiam Dorela revenis el la lernejo, Dodo rekonis ŝin ekde malproksime kaj bonvenigis ŝin kantante ŝian nomon:

“DO... RE... LA...”

Dorela prifieris pri sia verda amiketo kaj diradis al siaj gekolegoj:

“Jen mia lernanto Dodo. Mi instruas lin solfeĝi...”

Tiam la infanoj ridis.

Foje, Dorela malsaniĝis, sentis fortan premon en la gorĝo kaj komencis flustri anstataŭ paroli. La kuracistoj diris, ke ŝi bezonas nepran operacion. Ili promesis al ŝi, ke ĉirkaŭ du semajnojn post la operacio ŝi jam kapablos paroli normale, tamen ili ne certis ĉu ŝi povos ankaŭ kanti iam ajn.

Dorela ege maltrankviliĝis. Ŝi ĉiam revis fariĝi kantistino. Ŝi estis havinta apartan voĉon kaj tre talentis pri muziko, tial la tuta familio kaj ĉiuj konatoj konsideris ŝin onta kantistino... La ideo ke eble ŝi ne plu kapablos kanti estis por ŝi terura ŝoko...

La vesperon antaŭ la operacio, Dorela enlitiĝis kaj ekploris. Ŝi ne povis endormiĝi pro ĉagreno. Tiam ŝi petis aŭskulti trankviligan rakonton, samkiel ŝi kutimis peti kiam ŝi estis tre malgranda. Ŝia patrino sidiĝis apud la lito kaj komencis rakonti. Kaj jen tio, kion ŝi rakontis:

Foje, en fora urbo, vivis du ĝemelaj knabinoj en eta domo apud bela parko. Iliaj gepatroj estis kantistoj. La ĝemelinaj nomiĝis Mirela kaj Simila. Ili ambaŭ scipovis kanti kaj ludi gitaron, ili ambaŭ talentis, sed Mirela ja paciencis lerni muzikon kaj deziris fariĝi kantistino, dum Simila malpaciencis pri muzikaj ekzercoj, preferis matematikon kaj revis fariĝi inĝeniero. Ĉe la domo de Mirela kaj Simila, estis malgranda korto kun unu sola arbo. Verda papago kaj ruĝa papagino faris neston en tiu arbo. La ĝemelinaj nomis la papagon Mimi kaj la papaginion Sisi. La gepapagoj estis tre muzikemaj kaj ĉiutage ricevis kun granda plezuro lecionojn pri solfeĝo. Mirela estis la instruistino de Mimi, kaj Simila estis la instruistino de Sisi. Tagmeze, kiam la ĝemelinaj revenis el la lernejo, la gepapagoj rekonis ilin de malproksime kaj bonvenigis ilin kantante:

“MI... RE... LA...”

“SI... MI... LA...”

La gepapagoj ŝatis ankaŭ imiti vortojn, kaj la knabinoj komencis instrui al ili Esperanton. Unu someron, en ilia urbo okazis Universala Kongreso de

